408.92(075.4) = 20

J. Cresswell kaj J. Hartley, M. A.: **Teach yourself Esperanto.** Eldonaĵo de „*The English Universities Press Ltd.*" en la serio „*Teach Yourself Books*". Unua eldono, 1957, Londono. Formato 11,5 × 18 cm²; 205 paĝoj; plaĉa blua tolbindaĵo. Prezo neta: £ -/7/6.

Ĉi tiu nova lernolibro de du aŭtoroj diplomitaj de BEA, traktas la internacian lingvon en 16 lecionoj en interesa maniero. Post enkonduka „leciono", en kiu la aŭtoroj donas bonajn konsilojn kiel lerni, speciale por tiuj kiuj studi ne kutimas, rakontas iom pri la karakterizaĵoj de Esperanto, kaj pri la aranĝo de la libro mem, en la unuaj kvin lecionoj ili traktas la plej necesajn gramatikaĵojn kaj vortojn rilatajn al la familio kaj la domo kaj la proksima ĉirkaŭaĵo, kaj en la kvina leciono instigas la lernanton al ekkorespondo per ekzempla letero de norvega samideano.

En la sekvaj tri paĝoj la aŭtoroj konsilas kiel praktiki la lingvon, kiel ekzerciĝi, kiel akiri fluan parolon eĉ se la disponebla scio estas ankoraŭ tre limigita. Ĉiu el la lecionoj 6-16 estas dediĉita al iu speciala gazetrubriko kaj samtempe traktas iun parton de la Esperanta gramatiko. Tiuj „gazetrubrikoj" kaj „gazetartikoloj" temas pri ferio en Svislando, pri la veterprognozo, la radio- kaj televido-programoj, notoj pri la naturo (birdmigrado kaj ŝtataj parkoj), paĝo por virinoj, la vivo de Einstein, reklamoj, paĝo de flank-okupoj, leteroj al la redaktisto, paĝo por la semajnfino (kun enigmoj kaj anekdotoj), kaj diversaĵoj el la tuta mondo; ĉio ĉi tio estas kvazaŭ tondita el la gazeto kaj abunde kaj bele ilustrita.

Post la 16 lecionoj sekvas ankoraŭ rekomendoj por plua studo kaj pluraj aldonaĵoj: (1) tabelo de korelativoj; (2) tabelo de afiksoj; (3) la 16 reguloj de la fundamenta gramatiko; (4) tradukoj de la ekzercoj kaj solvoj de la enigmoj. La paĝojn 193-205 okupas vortaro esperanta-angla, kiu enhavas nur la vortojn (radikojn) troviĝantajn en la 16 lecionoj.

Per ĉi tiu aranĝo oni atingis ke la lecionoj estas interesaj kaj klare montras kiom oni povas esprimi per tre limigita vorttrezoro kaj kun nur parta scio pri la elementa gramatiko de la lingvo internacia. Certe ĉi tiu libro estas rekomendinda por ĉiuj kiuj scipovas la anglan lingvon, kaj tial ĝi meritas iom pli ampleksan recenzon ol Scienca Revuo ĝenerale povas dediĉi al lernolibro. Post ĉi tiu laŭdo iom da kritiko. Mi havas la impreson ke kelkfoje iom pli da klarigo ne estus superflua, ekz. pri tio ke la sufiksoj *ebl-*, *end-*, kaj *ind-* estu sufikse uzataj nur post transitivaj verbradikoj, aŭ kial post *da* neniam sekvas akuzativo (p. 77).

Domoj ne staras *sur* strato (p. 40), kaj urbo ne staras *sur* fervojo (p. 48).

Ne ĝusta estas la klarigo pri la signifo de *-op-* (p. 74, 175), sed sur



paĝoj 79, 82-84 ĉi tiu sufikso estas korekte uzata. *Orkestrestro* ne nomiĝu *konduktoro* (p. 80). Kaj *ino* (pri virino) estas esprimo kun malestima sencnuanco (p. 102). „*Imperia Moŝto*" estu „*Imperiestra Moŝto*" (p. 165).

Fakte mi skribis recenzon de triobla longeco kun iom da detala kritiko pri multaj pli-malpli bagatelaj mankoj. Sed mi decidis sendi tiun kritikon rekte al la eldonisto por utiligi ĝin por dua eldono, kiun mi elkore deziras por ĉi tiu tiel malteda lernolibro. — W. P. R.

001.8(075.4) = 30

**Ökonomie des Studierens (Ekonomio de la Studado)** de d-ro Joh. Riechert[1]). 223 p., 22 ilustraĵoj, bindita en artefarita ledo, prezo DM 5,40. — Eldonejo: Deutscher Verlag der Wissenschaften, Berlin, 1956. Livero por la Germana Respubliko Federacia kaj la okcidentaj sektoroj de Berlin per KAWE, Berlin-Charlottenburg, Jebensstr. 1. Livero por la eksterlando per Deutscher Buch-Export und -Import, Leipzig C 1, Leninstr. 16. — Mendojn akceptas ĉiu librovendejo. Bv. sciigi mendnumeron 10019.

La libro estiĝis el serio de 3 instruleteroj de la „*Fernstudium der Bergakademie Freiberg (Sachs)*" (*Korespondа studo de la mineja akademio en Freiberg/Sa.*): „*Racie vivi — pli bone lerni*", „*Bone ordigi — pli rapide trovi*", „*Penetre rezoni — pli klare skribi*". Ili estas multe disvastigitaj, atinginte eldonnombron de po 30000 ekzempleroj.

La 1-a parto entenas la ĉapitrojn: *Karaktero* (pozitivaj trajtoj, nestabila labor-plenumo), *higieno* (dormo, laciĝo kaj malstreĉo, stimuloj, profilaktiko, psika higieno, saniga nutrado), *medio* (profesio, edzeco aŭ soleco, komuna aŭ izolula lernado), *atentemo* (psikologia fundamento, specoj de atentemo, koncentrigaj ekzercadoj), *memoro* (intelekta lernado, ripetado, batalo kontraŭ forgesemo, memortipoj), *ekzamenoj* (tipoj de kandidatoj, ekzamenaj preparoj). La ĉapitroj pritraktas en simpla kaj klara lingvo la plej gravajn premisojn por sukcesplena studado, donante valorajn praktikajn instruojn. — La 2-a parto prezentas en facile komprenebla maniero la teknikajn helpilojn de verkisto. La ĉapitroj pri *komprenema legado kaj zorgema ellaborado*, pri *interesiĝema aŭskultado* (ĉu skribi laŭ gvidvortoj aŭ laŭtekste stenografi?), pri *fontoj* (enciklopedioj, ktp.), *kolektado de la materialo* (elĉerpaĵoj, propraj juĝoj), *ilaro kaj ekonomia organizo de la verkado* (ĉu man- aŭ maŝinskribo, paperformatoj, ordigiloj), *scienca sliparo, dekuma klasado, aranĝado de la laborejo* — ĉio ĉi rilatas al la praktiko. — La 3-a parto peradas praktikajn helpojn kaj laborteknikojn por ĉiu kiu verkas precipe sciencan verkon. Ĝi skurĝas oftajn

[1]) Vidu Sc. R. vol. 8-a, n-ro 2-a (30-a) p. 71.